# Kie esperanto plej necesas?







esperanto 2009

## *ĉar Eŭropo bezonas ĝin!*



Eŭropo Demokratio Esperanto

Eŭropo Demokratio Esperanto (EDE) estas politika movado kiu naskiĝis en Francio kaj Germanio en 2004. Tiu civitana movado sukcesis partopreni la eŭropan baloton en junio 2004.

Milionoj da francoj vidis filmetojn pri Esperanto sur la naciaj televidaj kanaloj. Dank'al tiuj senpagaj filmetoj kaj al la afiŝoj kaj gazetaj artikoloj, EDE ricevis 25 000 voĉdonojn.

Multaj el tiuj voĉdonantoj ne estas esperantistoj sed simple opinias ke Esperanto estas bona ideo kaj ke ĝi estas utila ilo por Eŭropo.

Por konstrui Eŭropan Union, por ebligi debaton inter eŭropaj civitanoj, ni devas proponi demokratiajn ilojn. La unua estas Esperanto.

### Ĉu pretaj por 2009 ?

La sekva Eŭropa baloto okazos en 2009. Tiam la movado Eŭropo Demokratio Esperanto esperas partopreni la baloton en multaj eŭropaj landoj. Tial via kunagado estas bezonata !

La efiko de balota kampanjo estas grandega: tiu ebligas sendi balotilojn kaj informilojn al ĉiuj voĉdonantoj de iu lando. Tuteŭropa balota kampanjo estas la plej vastskala kaj efika reklamkampanjo por niaj ideoj.

www.esperanto2009.eu